

Bulgara Esperantisto

Majo 1991



ENHAVO

- 3 Malnov-greka elemento de Esperanto (C. Murgin)
 6 Nikola Uzunov - 50-jara (N. Pilev)
 8 Unuiĝo de la E-movado en Germanio: Jen la unua paŝo (At. Ilkov)
 11 Sankta voto (Cydra)
 12 Verdaj steletoj
 14 Beletro: La morto de birdo (Em. Stanev)
 21 Enlanda movado (Cv. Todorov, R. Ilieva, VIO)

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA
 Redakcia konsilantaro: Dimităr HAĜIEV, Kiril VELKOV,
 Krăstju KARUCIN, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: "Ĥristo Botev" 97, 1303 Sofio - Bulgario,
 tel. 22-80-86

Ŝtata presejo "Georgi Dimitrov" - bul. "Lenin" 117, 1113 Sofio

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario "Bulgara Esperantisto" estas abonebla per la poŝto kontraŭ 9.60 lv. Por aliaj landoj - pere de naciaj poŝtoj kaj UEA (kodo: prsp-r) aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 ned. gld. aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por eksterlando pagita ĉe la redakcio de "BE" estas 25 lv. Prezo de unuopa ekzemplero - 1.00 lv. aŭ 3 ned. gld.

"Bulgara Esperantisto" kaj "Panorama Esperanto" tutjare estas aboneblaj ĉe firmao "Pres-Esperanto". Jarabono por 1991 de "BE" estas 12.00 lv. kaj de "PE" - 7.20 lv.

REKLAMTARIFO

1 paĝo	1/2 paĝo	1/4 paĝo	1/8 paĝo
712 lv.	356 lv.	178 lv.	89 lv.
990 gld.	495 gld.	247 gld.	123 gld.

La Redakcio de "BE" aperigas reklamojn en diversaj lingvoj ofertitajn de bulgaraj aŭ eksterlandaj entreprenoj, organizoj aŭ privataj personoj. Maklerajo por havigo de reklamoj 20%. Movada rabato 50%. Ekstera kovrilpaĝo kostas 50% pli. Rabato por tuja ripeto 20%.

"Bulgara Esperantisto" havas abonantojn en 57 landoj.

Represo el "BE" permesata, indiko de la fonto bezonata.

Estas organizita regula surbendigo de "Bulgara Esperantisto" por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Estimataj Legantoj

Kiel mi jam skribis en n-ro 1/91 de nia revuo, malgraŭ ĉiuj enlandaj problemoj "Bulgara Esperantisto" plu aperas. Dum la pasinta duonjaro kaj komence de tiu ĉi jaro la periodaĵo ofte malfruiĝis pro diversaj teknikaj kaŭzoj: manko de prespapero kaj filmoj, neregula presado kaj dissendado fare de la ŝtataj entreprenoj, kiuj okupiĝas pri tio. Dum tiu periodo la redakta skipo ĝustatempe preparis la tekstojn por la numeroj, kompostis kaj enpaĝigis ilin per la komputilsistemo de firmao "Pres-Esperanto" (en kiu interalie funkcias ankaŭ la redakcio de "Bulgara Esperantisto").

Por certigi la ĝustatempan aperadon de "BE" kaj la aktualecon de ĝia enhavo, la Estraro de BEA decidis, ke ekde n-ro 5/91 la revuo estu presata en la presejo de firmao "Pres-Esperanto". Ties presmaŝinoj ne estas tiom potencaj kaj la trovebla papero - sufiĉe bonkvalita, sed en tiuj malfacilaj kondiĉoj, kiam malaperas tiom multaj eldonadoj, inkluzive ankaŭ esperantistaj, plej gravas konservi la revuon, kaj ne tiom ĝian kvalitan aspekton. Ni lasu tiun nepre necesan postulon al pli bonaj tempoj.

Pro teknikaj kialoj eble niaj abonantoj ricevos numeron 5 de nia revuo antaŭ la numeroj 3 kaj 4.

Do, estimataj legantoj, ni arde esperas, ke vi kaj ni (la redakcianoj) restos kune - fidelaj unu al aliaj ankaŭ en tiu altrudita situacio.

Ni memorigas al tiuj, kiuj kontribuas al "BE", ke iliajn korespondadojn kaj artikolojn por la koncerna numero ni atendas ĝis la 10-a de la antaŭa monato.

En la nomo de mi kaj miaj kolegoj sincere salutas vin:

Sur la unua kovrilpaĝo: Rila-monaĥejo.

Foto: Ivan GRIGOROV

Maria JANKOVA

TURISMA REGRESO KAJ PROGRESO

La jaro 1990 en la internacia Esperanto-turismo estis jaro de regreso kaj samtempe - eĉ se tio strange sonas - jaro de progreso.

La politikaj ŝanĝoj, precipe en Eŭropo, estis kompreneble pozitivaj por Esperanto-turismo. La ekonomiaj ŝanĝoj en la t.n. orienta Eŭropo kaŭzis tamen grandajn problemojn. En Hungario likvidiĝis pro manko de klientoj la Esperanto-sekcio de "Express". La pola "Esperantotur" malgrandigis la nombron de turistoj sendataj al eksterlando de 18 mil (en 1989) ĝis ĉirkaŭ 10 mil (en 1990).

Krom la ekonomia situacio, la ĉefajn problemojn kaŭzis la viza kaj landlima diskriminacioj. Iam, kiam iu homo en iu lando ne ricevis pasporton, oni laŭte kriis pri malrespektado de la homaj rajtoj de la Fina Akto de Helsinko ktp. Nun amase la okcidentaj landoj rifuzas vizojn al aliaj, mem malobeante siajn sindevigojn al Helsinko pri la libereco de homa moviĝo. Absurdan rekordon atingis la brita ambasado en Varsovio, kie el 120 kandidatoj por E-vojaĝo al Britio nur 6 (ses!) personoj ricevis la vizojn.

En la kanada ambasado en Varsovio el pli ol 80 kandidatoj vizojn ricevis 8 (ok)

personoj. Pli boniĝis iom la situacio en la usona ambasado: en 1989 vizojn ricevis 112 personoj el ĉ. 600, en 1990 jam unu triono (90 el ĉ. 300). Decembre vizojn por tri busoj rifuzis la belga ambasado; nun nova belga konsulo promesis, ke tio ŝanĝiĝos. Danlando, Svedio, Germanio deklaris, ke ekde januaro ili likvidos vizojn por poloj, sed la deklaroj restis ĝis nun surpaperaj.

Ankaŭ inter la t.n. orienteŭropaj landoj nun furoras diskriminacio, malgraŭ ke turismo inter ili ankoraŭ eblas sen vizoj. Por veni buse el Sovetunio al Pollando necesas atendadi ĉe lim-trapasejo eĉ ĝis 70 horojn! Decembre sovetiaj limgardistoj bezonis 22 horojn por kontroli kvar busojn kun gejunuloj (unu de "Esperantotur", la ceteraj tri de aliaj organizaĵoj).

La problemoj ne koncernas nur ĉi tiun mondoparton. Ĝus mi revenis de la sukcesa 1-a Afrika Kongreseto, por kiu mi mem nur lastmomente ricevis vizojn. Evidentiĝis, ke ankoraŭ pli malfacile estas por afrikanoj, ĉar unue ili devas veni Eŭropon kaj nur tie eblas por ili havigi pluajn vizojn. Kompreneble tiaj viza kaj landlima diskriminacioj estas kontraŭ la homa digno kaj la homaj rajtoj, kaj ege malhelpas ankaŭ la

internacian Esperanto-turismon. Pro tio ni devus ĉiuj kontraŭstari ilin.

Krom regreso, en 1990 estis ankaŭ progreso. Septembre dum la 16-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo en Bydgoszcz renkontiĝis aktivaj esperantistoj el 21 landoj kaj pliboniĝis la internacia kunlaboro en la sfero de Esperanto-turismo. "Monda Turismo" okazigis sian 8-an Ĝeneralan Konferencon en Istanbul kaj sekve leĝe registriĝis en Bydgoszcz. De la 16-a ĝis la 19-a de decembro okazis en la Ora Ringo de Rusio - Moskvo, Zagorsk, Vladimir kaj Suzdal - la 6-a Internacia Simpozio de Monda Turismo, kun pli ol cent partoprenantoj.

Por 1991 estas planata tutjara

internacia karuselvojaĝo tra ok landoj de Eŭropo kaj ok vojaĝoj Eŭropo-Ameriko. De la 5-a de majo ĝis la 9-a de junio okazos la vojaĝo "Siberio-91" tra la sudaj kaj orientaj partoj de Sovetunio, kaj ankaŭ dum majo busvojaĝo ĝis Maĥaĉkala (Dagestano) por la 7-a Internacia Simpozio de Monda Turismo, temo "Esperanto-turismo inter Eŭropo kaj Azio". Estos ankaŭ karavanoj al la 76-a Universala Kongreso de Esperanto en Bergeno. Kaj eble okazos eĉ la unua esperantista grupvojaĝo ĉirkaŭ la mondo?...

Ni plu disvolvigu komune la internacian Esperanto-turismon!

El "Esperanto" - 2/1991

BEK PROSPERAS

La 1-an de marto 1991 okazis la 45-a jarkunveno de Bulgara Esperantista Kooperativo (BEK). La delegitoj denove estis surprizitaj de bonaj financaj rezultoj atingitaj dum la raportata ekonomia jaro 1990. Malgraŭ la ekzistantaj malfacilaĵoj en la produktado kaj en la komerco la rezultoj estas pozitivaj. La enspezoj de la produktado estas pli ol 4 milionoj kaj de komerco - 3 778 000 levoj. La profito atingis 817 000 lv.

Dum la pasinta jaro la Kooperativo laboris per propraj rimedoj ne uzante bankajn kreditojn. Je la 31-a de decembro p.j. la kooperativa kapitalo prezentas 3 553 000 levoj.

La financa stabileco ne estas hazarda. Ĝin rezultigas ĉiuj produktaj unuoj kaj magazenoj, kiuj laboras ĉe interna ekonomia konto.

Por la Bulgara Esperanto-Asocio kaj por la bibliotekoj ĉe la Esperanto-societoj kaj -kulturdomoj oni donacas senpage librojn je sumo de 12 000 lv. Tio estas bona starto por plibonigo de la rilatoj inter BEA kaj BEK.

En sia raporto la prezidanto de la Kooperativo inĝ. Maria Paskova kategorie substrekiis, ke la atingitaj pozitivaj rezultoj estas faroj de ĉiuj. Dank'al la bonega sperto dum 45 jaroj nun,

ĉe la kondiĉoj de merkata ekonomio, por la kooperativo venas tempo por vera disfloro. Tio dependos de tio ĝis kiu grado ĉiu membro-kooperativano trovos sian realan kaj efikan lokon en la multflanka vivo de la Kooperativo.

La jarkunveno akceptis "Gvidliniojn" por disvolviĝo de Bulgara Esperantista Kooperativo dum 1991" kaj elektis novan Administran Konsilantaron el 11 personoj, inter kiuj 4 esperantistoj. Defendante la interesojn de la membroj kaj de la laborantoj BEK ekiras novan vojon.

Dimităr MUTUŠEV

MALNOV-GREKA ELEMENTO DE ESPERANTO

Esperanto aperis en 1887. Estante vivkapabla ĝi ekvivis sian socian vivon. Oni lernis ĝin kaj entuziasme varbis novajn adeptojn. La facileco de Lingvo Internacia estis la plej forta propagandilo. Oni korespondis kaj interŝanĝis ilustritajn poŝtkartojn, oni verkis kaj tradukis en prozo kaj en poezio. Zamenhof, kiu estante dekjara knabo, revis fariĝi ruslingva poeto, komencis en sia dudeka jaraĝo verki poemojn kaj traduki tiajn el germana kaj rusa lingvoj. Lia revo fariĝi poeto realiĝis. Liaj intime lirikaj poemoj en la komenco kaj en la fino estis profunde kortuŝaj, liaj himnoj estis sublimaj, liaj poemoj pri sociaj kaj "organizaj" temoj estis instige rezultodonaj al agado por internaciaj kaj komunehomaj aferoj.

Oni legis kaj parkeris, oni verve diskutis. Aperis kaj rapide vastiĝis la Internacia Kulturo en Esperanto. Ĝi estis tiu forto nevidebla, kiu altiris vigle laborantan rondon ĉirkaŭ Zamenhof. Pasis kvaronjarcento - neniuj interesiĝis pri la efektiva genezo de Esperanto. Pasis trionjarcento - vere aŭtoritata kompetentulo diris, ke ne Zamenhof, sed Antoni Grabovski estas la patro de Esperanta poezio. Neniu kontraŭdiris, neniuj provis korekti la maljustaĵon. Kia senprincipa toleremo regis en la Esperanta Komunumo!

Pasis la infanaj jaroj de Esperanto. Oni revenas al la primaraj fontoj kaj aŭtentaj faktoj

el la vivo de Zamenhof kaj el la vivo kultura de la esperantistaro. Oni starigis tezon pri la genezo de Lingvo Internacia, tamen la problemoj pri patro de Esperanta poezio daŭre statas en primitiva, mistika missolvo...

Pri la genezo de Esperanto oni malkovris, ke ĝi estas plejparte latina kaj latinida, iom germana kaj apenaŭ rimarkebla estas la kontribuo de la slavaj lingvoj. Pli-malpli tio estas bona atingiĝo, sed Esperanto konsistas ne el tri, sed el kvin komponantoj.

Jam delonge fakuloj certigas, ke en la vortaro de Esperanto 60 % venas laŭ genezo el latino kaj lingvoj latinidaj, 30 % - el germana kaj ĝermanaj lingvoj, kaj nur 10 % - el slavaj lingvoj (malnovbulgara, rusa, pola k.a.). Tute certe, la menciitaj procentoj bezonas diserigon kaj precizan eksplikon.

Do, por la esperantistoj en latinidaj landoj estas facile lerni 60 % de la Esperantaj morfemoj (20 % - latino, 20 % - el malnovgreka kaj 20 % - el la modernaj lingvoj latinidaj). Por la esperantistoj germane kaj ĝermane parolantaj ankaŭ estas konataj 60 % de la Esperantaj morfemoj (30 % - el germana kaj ĝermanaj lingvoj, 15 % - el latino kaj latinidaj lingvoj kaj 15 % - el malnovgreka). Ŝajne la esperantistoj en la slavaj landoj estas en malfavoraj kondiĉoj tiurilate. Sed ne, tute ne! Ankaŭ por ili estas familiaraj multe pli ol

50 % de la Esperantaj morfemoj (10 % el slavaj lingvoj, 15 % - el malnovgreka kaj 15 % - el latino kaj lingvoj latinidaj, plus varia procento de germanaj vortoj). Por la ruslingvanoj tiu procento estas plej alta. La germanajn vortojn en Esperanto Zamenhof unue renkontis kiel fremdajn vortojn en rusa lingvo. Rusa kaj pola lingvoj kribris la fremdajn vortojn kaj absorbis nur tiujn, kiuj estis vere bezonataj. El ties germandevenaj fremdaj vortoj Zamenhof elektis grandan provizon por Esperanta vortaro. En latinidaj lingvoj oni malofte renkontas germanan vorton. Tiajn vortojn Zamenhof trovis kun admiro pro abundo en rusa lingvo kaj li elektis kaj esperantigis ilin.

Aliaj faktoroj, kiuj kontribuas al amasiĝo de fremdaj vortoj en naciaj lingvoj estas la internaciaj komerco, vojaĝoj, kongresoj, amaskomunikiloj. Specife kontribuas la lernado de fremdaj lingvoj. Plej amase oni lernas anglan, francan, germanan, hispanan, rusan, portugalan k.a. Zamenhof konis perfekte rusan kaj jidan, polan, germanan, malnovgrekan; bonege - latinon kaj francan; bone - ivriton (malnovhebrea), malnovbulgaran kaj anglan lingvojn. Krome, Zamenhof havis elementan konon pri kelkaj aliaj lingvoj, en kiuj li povis kompreni pri diferenco inter skribo kaj prononco de la vortoj. Zamenhof estis neordinara poligloto. Eĉ pli, li estis alte instruita en la lingvosciencaj temoj kaj speciale en lingvokonstruado, planlingvistiko. Oni ne forgesu, ke Zamenhof finis sian mezan instruitecon en la Dua Filologia Gimnazio de Varsovio (1874-1879). Dum sia tuta studado en la Universitatoj de Moskvo (1879-1881) kaj de Varsovio (1881-1884) Zamenhof vizitis lingvoinstruajn lekciojn. Tiamaniere, kune kun studo de medicino li daŭre perfektigis en konkreta kono de lingvoj modernaj, klasikaj kaj en la lingvistiko.

Krom tio, Zamenhof konis ĉiujn gravajn kontribuojn (ekde 1629) de siaj antaŭuloj por starigi internacian planlingvo . Ĉe tiaj cirkonstancoj Zamenhof scipovis facile orientiĝadi, lerte kompari, trafe elekti tion, kion li bezonis en ĉiu etapo por starigi sian Lingvon Internacian.

Ne hazarde, Zamenhof foje asertis, ke se iam kompetentulo decidus entrepreni starigon de nova internacia planlingvo, ties vortaro estos preskaŭ identa kun tiu de Esperanto ĝis 90 %. La diferenco, pro persona prefero aŭ konsidero, estos nur 10 %. Zamenhof ne motivas sian prognozon, sed oni povas supozi, ke li pensis pri la vaste konata internacia kerno de malnovgreka-latina vortrezoro, kompletigita per ĝermana, latinida kaj slava elementoj. Jen la kaŭzo pro la kvin-pinteco de la Verda Stelo.

La malnovgreka komponanto de Esperanto estis subtakata kaj eĉ nerimarkata en sia tuteco. Ordinare oni supozis, ke malnovgreka elemento de Esperanto estas io sporada, rare renkontebla. Mia celo estas nun starigi la problemon kaj lanĉi tezon pri la imponeco de la malnovgreka komponanto de Lingvo Internacia.

Eĉ ĉe rapida foliumado de Esperantaj vortaro aŭ libro oni rimarkas, ke la grekdevenaj morfemoj aperas post negranda intervalo kaj lasas neviŝeblan impreson, ke ili daŭras kiel fadeno de komenco ĝis la fino de tiu verko. Jen eta, modesta ekzemplo:

<i>vorto</i>	<i>de</i>	<i>lingvoj</i>
<i>malnov-greka</i>	<i>rusa</i>	<i>Esperanto</i>
athomos	atom	atomo
axioma	aksioma	aksiomo
anabaptizo	anabaptist	anabaptisto, -o

anagrama	anagrama	anagramo
analogos	analog	analogo, -o
analysis	analiz	analizo
bromos	brom	bromo, -o
dekas	deka-	dek
dekados	dekada	dekado, -ad-, -o
demagogos	demagog	demagogo, -o
dosis	doza	dozo, -oz-
ektremein	-	ek-, trem-, -i; ajn
ephemeros	efemernij	efemero, -o
-id-	-id-	id-, -id-
kaj	-	kaj
kosmos	kosmos	kosmo, -o
krisis	krizis	krizo
kyklon	ciklon	ciklono, -o
kyklos	cikl	ciklo, -o
kylindros	cilindr	cilindro, -o
mania	manija	manio
megas	mega-	mega-, -eg-
morphe	morfema	morfemo
panikon	panika	paniko, -o
paradoxos	paradoks	paradokso, -o
parasitos	parazit	parazito, -o
psalmos	psalom	psalmo, -o
phrasis	fraza	frazo
schema	shema	skemo
schisma	shisma	skismo
semaforo	semafor	semaforo, -o
sinapi	sinap	sinapo
systema	sistema	sistemo
syntesis	sintez	sintezo
theatron	teatr	teatro, -o
thema	tema	temo
thesis	tezis	tezo
thorax	toraks	torako

Analizante tiujn hazarde elektitajn 37 vortojn kaj unu sufikson el malnovgreka lingvo, mi

konstatas, ke el ili Zamenhof skulptis la formon de 45 morfemojn de Esperanto. Inter ili 38 estas radikoj (inkluzive de "ajn"), 2 - finaĵoj ("-i", "-o"), unu - prefikso ("ek-") kaj 4 - sufiksoj ("-ad-", "-eg-", "-id-", "-oz-"). El malnovgreka infinitiva finaĵo "-ein" Zamenhof ekstraktis la Esperantan "-i" kaj kreis la radikon "ajn". Tiuj radikoj, afiksoj kaj finaĵoj atribuas al Esperanto iom el la ĉarmo de antikva lingva klasikeco grekdevena. Ili estas fajne elprovitaj dum jarmila uzado kaj atribuas al Lingvo Internacia relativan stabilecon kaj internaciecon, dinamikan vivantecon kaj vitalan memperfektiĝon.

Kune kun la Diplomo pri Matureco Zamenhof ne hazarde ricevis (1879) Certigilon pri senriproĉa posedo de malnovgreka lingvo. Per tiu li povis okupi postenon de tradukisto, redaktoro, cenzuristo. Evidente, tiujn siajn konojn Zamenhof jungis nur por sukcesplena planlingvisma verkado.

Certe en la estonta epoko de monda paco oni kompilos fakvortaron pri greka komponanto de Esperanto. Tiam oni ĝuos observi ne sporadajn, ne centojn, sed plurajn milojn da radikoj, afiksoj, finaĵoj kaj kunmetitaj vortoj en Esperanto, laŭ genezo el la klasika malnovgreka lingvo.

Kono pri genezo de Esperanto estas efika en informado kaj varbado.

Canko MURGIN

Nikola Uzunov — 50-jara



Nia konata samideano Uzunov estiĝas kvindekjara. Li naskiĝis la 17-an de julio 1941 en urbo Ĥaskovo, kie loĝas ankaŭ nun. En 1968 Uzunov finis la Fakon pri Maŝinkonstruado de la Supera Maŝin-Elektroteknika Instituto en Sofio kaj diplomiĝis kiel maŝiningeniero. Dum sia profesia aktivado li laboris kiel konstrukciisto, teknologo, fakestro kaj vicdirektoro en Maŝinprodukta Fabriko, fakinstruisto en mezlernejo kaj direktoro de Ekonomia Entrepreno "Globus" en sia

naskiĝurbo Ĥaskovo.

Esperanton N. Uzunov eklernis en la jaro 1961. Li finis la E-kursojn ĉe la Sofia Universitato en 1963. Ekde tiam ĝis nun li aktivas seninterrompe sur diversaj agadkampoj de la nacia kaj internacia

Esperanto-movado. Li estis ano en la estraroj de la studenta kaj junulara E-movado en la periodo 1963-68 - sekretario kaj vicprezidanto de la sofia studenta E-societo "Vela Peeva", aktivulo kaj funkciulo de STELO. Ekde la jaro 1964 kun iuj interrompoj Uzunov estas individua membro kaj fakdelegito de UEA.

Post sia reveno en Ĥaskovo-n ĝis nun Nikola Uzunov aktive kaj konstante partoprenas la organizan vivon de loka E-societo "Prof. d-ro Asen Zlatarov", kies prezidanto li estis dum pluraj jaroj. Li prezidantis same la Distriktan E-organizon -

Ĥaskovo, dum 8 jaroj. Ekde 1966 ĝis nun li estas membro de la Centra Estraro de BEA kaj de la nova Komitato de BEA.

Lia aparte aktiva agadkampo estas la instruado de Esperanto. N. Uzunov diplomiĝis kiel E-instruisto jam en la jaro 1965. Ekde tiam li regule gvidas diversgradajn kursojn - lokajn, regionajn, naciajn kaj internaciajn. Krom en la Internacia E-kursejo en Pisanica, kie li regule gvidas unua-, dua-, triagradajn kaj instrurajtajn kursojn jam 8 jarojn, oni invitas lin ofte gvidi kursojn en- kaj eksterlande - Pollando, Hungario, Jugoslavio kaj USSR.

Uzunov riĉigas sian Esperantan agadon per verkado kaj traduka laboro. Li regule kontribuis ĝis nun per multaj korespondajoj, informoj, artikoloj k.a. al landaj kaj internaciaj E-periodaĵoj - "Bulgara

Esperantisto",	"Paco",	persikoj" (1985).	"Tango"	fremdaj landoj el tutmondo.
"Panorama-Esperanto",		(1986), poemaroj	"Homoj,	Abunda estas la E-agado
"Espero el Koreujo" k.a.		antaŭen!" (1986),	"Tra la	de Uzunov. Mi elkore
Kelkajn liajn originalajn		venĝego" (1986),	"Nesto de	bondeziras al li sammaniere
poeziaĵojn	kaj	birdoj" (1987),	"De bordo al	plu labori kaj doni sian
rakontfragmenton	oni	bordo" (1988), amuzlibro		valoran kontribuon por
publikigis en la eldonita de		kun anekdotoj "Anekdotoj el		prospero e nia kara
BEA literatura antologio		Gabrovo" (1990) k.a.		Esperanto.
"Nesto de birdoj" (1987).		Krom tio N. Uzunov		Estimata Nikola Uzunov,
Estas aprobita kaj baldaŭ		redaktis plurajn librojn, inter		akceptu nian profundan kaj
aperos lia lernolibro		kiuj menciindas "Ruza Petro"		sinceran dankon! La societa
"Esperanto en dialogoj" kun		(1986), "Nesto de birdoj",		esperantistaro en Ĥaskovo
lingva-laboratoria kurso kaj		Esperanta-Bulgara Vortaro		tutkore bondeziras al vi
sonkasedoj. Pli multaj estas		(eldonota) k.a. Li		longan vivon, stabilan sanon
liaj E-tradukoj. Li estas		korespondas aktive en		kaj novajn sukcesojn sur la
kuntradukinto de la eldonitaj		Esperanto kaj havas		E-kampo.
de BEA novelaroj "Ŝtelisto de		korespondantojn en pli ol 12		

Nikola PILEV

AMIKECO

L. L. Zamenhof ofte memorigis, ke Esperanto estas nur ilo. Se li ne estus observinta terurajn manifestiĝojn de intergenta malamikeco en sia naskiĝurbo, certe li ne venus al la ideo pri komuna, universala lingvo, kiu povas kontribui al interkoniĝo de la popoloj kaj starigo de paco kaj amikeco inter ili.

Ni scias ĉion ĉi, sed malgraŭe ofte esperantistoj de unu sama societo malkonkordas pro neseriozaj kaŭzoj. Tia stato reflektas rekte al la stabileco de la societo kaj al la organizaj atingoj.

Antaŭ kaj dum la Dua Mondmilito en Varna ni havis unu el la unuaj laŭ aktiveco societoj en la lando, ĉar ni kunvivis kohere, ĉiuj ni estis geamikoj.

EN AMIKA ETOSO LA ORGANIZA LABORO ESTAS AGRABLA KAJ PROSPERANTA.

Kun tiuj pensoj mi venis al la ideo formi ĉe la societoj klubojn "Amikeco".

Kiel estas facile kompreneble, ilia unua tasko estos per kreo de amikaj interrilatoj progresigi la societan vivon, variigi ĝin, kaj sekve, stabiligi la societon.

Kvankam la fundamenta tasko de la

amikecklubanoj troviĝos en la societoj, ili povos sporade kunsidi en sia medio, komence precipe en amuza atmosfero (promenoj en la parko kaj urbaj ĉirkaŭaĵoj, vizitoj al teatraĵoj, sportaj ludoj, kafejoj, trinkejoj, amuzejoj), poste por diskuti interesajn demandojn de la literaturo, historio, organiza vivo...

Kiam kreiĝos pluraj tiaj kluboj, oni povus realigi renkontiĝojn inter ili, korespondadon kaj komunajn aranĝojn. La agado de la amikeckluboj certe reflektos al la stabiligo de BEA, variigo kaj plibonigo de ties multflanka aktivado. Tiucele oni povus transiri al diskutado de interesaj pli konkretaj demandoj, ekzemple: "Kiajn kvalitojn devas posedi gvidanto (prezidanto)?", "Kia estu la baza aktiveco de la societo?", "Ĉu BEA bezonas statuton? Kian?", "En kiaj formoj kunagadi kun eksterlandaj organizoj?", "Kio devas esti la baza aktivado de la Esperanto-movado?", ktp., ktp. - multaj estos la eventualaj temoj de la diskutkluboj.

Ĉiu interesiĝanto pri la problemoj povas turniĝi al: **Violin OLJANOV**, ul. Bojanski vodopad 241 E, 1404 Sofia (tel. 58-89-33).

Unuiĝo de la Esperanto-movado en Germanio:

JEN LA UNUA PAŜO

En Germanio junulara Esperanto-movado estas aparte forta. Laŭ komparo de membroj kaj buĝetoj, junulara kaj nejunulara Esperanto-asocioj de tiu lando reprezentas proksimume po duonon de la landa movado.

Tial, nun post la unuiĝo de la du germanaj ŝtatoj la 3-an de oktobro 1990, estas interese ne nur observi la paŝojn al unuiĝo inter la du nejunularaj landaj asocioj de UEA en Germanio, sed ankaŭ la reagon de la junaj esperantistoj - des pli, ĉar ili jam silvestre solvis la problemojn de sia organiza novstrukturiĝo.

Ĉi-sube Atanas ILKOV parolas kun Thomas Pusch, prezidanto de la nova Germana Esperanto-Junularo. (Parto de tiu intervjuo jam aperis en la marta numero de la revuo "Esperanto".)

"BE": *Gratulojn por via nova posteno kiel prezidanto de GEJ. Ĉu vi estas feliĉa gvidi la junajn germanajn esperantistojn en la unuiĝita Germanio?*

TP: Mi pasigis plurajn semajnojn en la regionoj de eksa GDR dum la pasinta aŭtuno, speciale en Orienta Berlino, klopodis paroli kun laŭeble plej multaj junaj esperantistoj kaj konstatis, ke tre multaj el ili estis profunde seniluziigitaj pro tio, ke iliaj revoj konstrui novan "alternativan" ŝtaton en GDR post la revoluciaj ŝanĝoj de 1989 ne realiĝis. Certe iliaj vivkondiĉoj tre pliboniĝis, unuafoje eblis vojaĝoj, kontaktoj ĉien ajn. Sed ilia ĉirkaŭaĵo tute renversiĝis, tiom rapide ŝanĝiĝis de realsocialisma al okcidenteŭropa

mondo, ke multaj el ili ekhavis antipatiojn kontraŭ tio, ke ĉio el okcidento ŝajnis tiom arogante supera... tial ili eĉ ne povis imagi samnivele kunlabori kun la junaj esperantistoj el okcidenta Germanio.

Jes, mi ĝojas, ke ni sukcesis tiom rapide superi la ambaŭflankajn timojn, ke rapide ekestis veraj amikecoj inter ni kaj ke ni komprenis, ke nia komuna esperantisteco multe pli ligas nin ol povus dividi nin nia malsama pasinteco.



"BE": Ĉu vi opinias, ke la junaj esperantistoj el eksa GDR, tiom kontraŭintaj la ŝtatan unuiĝon de la politikistoj, nun sentos sin hejme en la nova tutgermana Esperanto-Junularo?

TP: Nu, estas vere, ke - cetera laŭ unuanima decido de la membraro de Esperanto-Junularo de GDR - la nova asocio havas la nomon "Germana Esperanto-Junularo" same kiel la ĝisnuna okcidenta organizo kaj ke ĝi ankaŭ transprenos la nomon de la ĝisnuna okcidenta membrobulteno "GEJ-gazeto". La decido pri transpreno de la okcidenta nomo estas pure praktika: Ekzistas multaj miloj da informiloj kun tiu nomo - estus stulte forĵeti ilin - kaj la ĝisnuna GEJ estas ĉiurilate agnoskita kiel asocio - estus stulte post nomoŝanĝo devi formalisme batali kun ĉiaj institucioj pri nova agnoskiĝo, dum indas uzi la tempon por pli gravaj taskoj. Sed mi ekspertis, ke la aktivaj membroj de la Esperanto-Junularo de GDR, asocio kiu mem nur fondiĝis en aprilo 1990, ne havas la senton, ke iliaj atingajoj de la lastaj monatoj ne reprezentigis en la nova asocio:

Estas simbola signo, ke la nova Germana Esperanto-Junularo estonte havos du oficejojn, unu en la registara kvartalo de Bonn en la okcidento de la lando kaj plian ĉe la parada bulvardo "Unter den Linden" meze de Berlin, la antaŭa ĉefurbo de GDR.

La nova GEJ nun kiel posteulo de la Esperanto-Junularo de GDR membroj en la tegmenta "Demokrata Junulara Ligo", kiu evoluis el la "Ronda Tablo de la Junularo de GDR" establita post la revoluciaj ŝanĝoj de 1989 kaj nun kunigas aron de progresemaj malgrandaj junularaj asocioj. GEJ kune kun tiuj partneraj asocioj klopodos agnoskigi tiun ligan kiel novan branĉon de la (ĝis nun okcident-)germana ligo de junularaj asocioj, kies membroasocioj principe devas havi pli ol 25 000 membroj - celo neatingebla por multaj malgrandaj junularaj asocioj kiel ni.

La unua decido de la membrokunveno de la nova GEJ cetera estis duonigi la membrokotizon 1991 por junuloj el la eksa GDR. Tio estu signo, kiu aparte bonvenigu la junajn esperantistojn el la orienta landoparto en la nova asocio.

"BE": Ĉu GEJ havos financajn problemojn pro la unuiĝo? Finfine apenaŭ iu Esperanto-asocio en Okcidenta Eŭropo sukcesas vivteni du oficejojn...

TP: Estas klare, ke kun nur 2 600 - el tio 400 vere pagantaj - membroj kaj jara buĝeto de ĉirkaŭ 150 000 gld. ni estas modesta malgranda asocio, kompare kun aliaj organizoj de FRG.

Sed fakte la lastaj monatoj alportis neatenditan financon subtenon al ni. Pro tio ke la junaj esperantistoj estis inter la progresemaj grupoj kiuj fondiĝis tuj post la falo de la malnova realsocialisma reĝimo, kaj eble por iom kompensi la longan antaŭan subpremon de sendependa junulara Esperanto-movado en GDR, la Ministerio pri Junularo en Orienta Berlino kaj eĉ la koncerna Ministerio en Bonn somere de 1990 malavare donis financon helpon de entute preskaŭ 50 000 gld. al la Esperanto-Junularo, por aĉeto de oficejaj mebloj, maŝinoj kaj ekipaĵoj. Kvankam tiu neatendita kaj fabela subteno ne daŭros dum tiu ĉi jaro, ĝi donis fortan antaŭenpuŝon al nia asocio. Certe do la Esperanto-Junularo de GDR, kvankam ĝi vivis nur de aprilo ĝis decembro 1990 kaj pro interpersonaj kvereletoj ne sukcesis vere ekfunkcii, alportis multe pli al la asocia unuiĝo ol ĝi prenis... same kiel la okcidenta asocio. Ni simple ĉiuj kiel asocioj profitas.

"BE": Kia estas via programo kiel estro de GEJ?

TP: Unue mi ŝatus emfazi, ke mu tute ne sentas min estro - male, mi tre feliĉas esti ano en teamo de almenaŭ kvardek aktivaj junaj kunlaborantoj de la nova GEJ, inter kiuj regas vere agrabla etoso. Speciale mi ĝojas, ke la averaĝa aĝo de nia nova okcident-orienta estraro estas nur 22 jaroj (du el la naŭ estraranoj estas eĉ nur 17-jaraj), kaj la averaĝa aĝo de la aliaj kunlaborantoj estas plimalpli sama. Ni do jam nun povas certi pri la pluekzisto de nia asocio dum la venontaj ses ĝis ok jaroj... tio estas multo ĉe junulara asocio.

Fakte post dekkvin jaroj da konstantaj etaj progresoj ni finfine troviĝas en situacio, en kiu ni ne plu devas honti kaj plibelige

mensogeti pri nia asocio en kontakto kun la neesperantista mondo. Ni havas pli da memfido, povas pli celkonscie plani niajn financojn kaj realigi modestajn projektojn, pri kiuj ni antaŭe neniam kuraĝis pensi: Nia membrogazeto pliboniĝos, nia tuta fasko da informiloj kaj varbiloj jam lastjare aperis en grandaj kvantoj, al tio aldoniĝos propra glumarko kaj T-ĉemizo, ni realigos eldonon de alternativa priesperanta lingvogvidilo kunlabore kun konata nemovada eldonejo kaj plikompletigos nian porjunularan korespondan kurson.

La nova instrufaka komisiono de GEJ eldonos instruhelpilojn kaj faros kursojn por junaj kursgvidantoj, ĉar plej urĝe ni bezonas pli da semajnfinaĵoj kaj semajnaj intensaj lingvokursoj, precipe en malcentraj regionoj... kaj laŭeble por lernejoj preskaŭ senkostaj.

Kompreneble necesos plenigi la unue nur surpaperan tutgermanigon de nia asocio je vivo: La kontaktoj inter la du oficejoj unue estos iom malfacilaj, ĉar ankoraŭ sendi leterojn inter la du partoj de Germanio daŭras longe kaj telefoni respektive telefaksi estas preskaŭ neeble. Ni esence celos varbi novajn junajn membrojn en ĉiuj partoj de nia lando, ankaŭ per helpaj instigoj al niaj iom malfortaj lokaj grupoj kunhelpi pri tio, kaj gajni novajn aktivajn kunlaborantojn speciale en la novaj orientaj regionoj de FRG: Ĝis nun malmultaj junaj esperantistoj tie vere ekvivis en la internacia Esperanto-movado samgrade kiom iliaj samaĝuloj en okcidenta Germanio... kaj tial estas ankoraŭ malpli iniciatemaj. Sed mi esperas kaj certas, ke tio rapide ŝanĝiĝos.

Krome ni organizos internacian someran renkontiĝon en Stralsund ĉe la Bata Maro en la nordo de iama GDR, kiu okazos tuj antaŭ la IJK en Karlskoga, kaj kompreneble ni jam ekplanas la venontan silvestran Internacian Seminarion, nia tradicia ĉefa renkontiĝo, kiu intertempe allogas 400 junajn partoprenantojn el 30 landoj kaj estas sendube la plej sukcesa ĉiujara Esperanto-renkontiĝo en nia lando.

Kaj nelaste ni klopodos kiel ĝis nun ne-tro-multekostigi niajn renkontiĝojn por orienteŭropanoj, ĉefe per oferto de vere malmultekosta kotizokategorio por memzorgantoj kun tranoktebleco en

gimnastikejoj. Ni estas konvinkitaj, ke estas tre domaĝe por nia internacia movado, se nun, kiam homoj el multaj orienteŭropaj landoj rajtas pli libere vojaĝi eksterlanden laŭ siaj hejmaj registaroj, la kotizaj limoj de okcidentaj renkontiĝoj montriĝas tro altaj por ebligi partoprenon de orientaj movadanoj.

Cetere aparte de tio plufunkcios niaj modelaj programoj pri sendeviza personinterŝanĝo kun la Esperanto-Junularoj en Ĉeĥio, Sovetunio, Litovio, Bulgario kaj Rumanio, kiuj tamen nur povas partoprenigi relative malmultajn junajn orienteŭropanojn en niaj aranĝoj.

"BE": Fine, via opinio pri la nejunulara parto de la Esperanto-movado en via lando?

TP: Verŝajne fariĝis sufiĉe klare, ke la ŝtata kunfandiĝo de du landopartoj kun socialisma kaj kapitalisma pasintecoj montriĝis multe pli simpla ol la forigo de kompleksoj kaj baroj en la homaj kapoj. Kelkaj el la esperantistoj en mia lando devos lerni superi siajn sentojn de trofiero, forgesi la bremsan troformalismon kaj alveni kun la preteco vere teame labori pri la konstruo de komuna asocio, kiŭ ne havu ajnan diferencigon inter eksaj okcidentanoj kaj eksaj orientanoj. Sed tiu peno certe indos.

La Esperanto-Asocio de GDR momente estas strukture disfalanta, sed ankaŭ la okcidenta Esperanto-Asocio (kies aktivuloj certe havas altajn esperojn pri la asocia unuiĝo) ne perfekte funkcias, kvankam en nia lando estas sufiĉe da esperantistoj por teorie ebligi brilan komunan asocion. Laŭ mi la nejunulara Esperanto-movado en nia lando povus gajni multe pli el asocia unuiĝo ol la junulara.

Mi esperas, ke la harmonia kaj relative senstreĉa kunfandiĝo de la nova GEJ estas bona antaŭsigno por la unuiĝo de la ĝenerala Esperanto-movado en Germanio.

SANKTA VOTO

Du monatojn post la fino de la Dua Mondmilito, en loantana provinca urbo, juna skoto eniris tavernon. Li mendis por si du malgrandajn glasojn da viskio, konsumis ilin en daŭro de horkvarono, pagis al la priservanta kelnero kaj forlasis la subteran establejon.

La sama bildo okazis en pluraj sinsekvaj vesperoj.

Nesukcesinte rezisti sian sciemon, la kelnero demandis la strangan vizitanton.

- Permesu, sinjoro, kial vi por unu persono mendas du malgrandajn glasojn da viskio, sed ne unu, tamen grandan?

La skoto suspiris. Per silka poŝtuko li viŝis humidajn okulojn kaj malgaje ekvortumis:

- La afero estas vere trista. Dum la kruela milito, kiel piloto, mi havis nedisigeblan amikon. Ĉiun vesperon kune, en bona humoro, ni trinkis po glason da viskio. Iun tagon, laŭ lia ideo, antaŭ ikono de Sankta Dipatrino, ni ĵuris: se iu el ni ambaŭ pereos, la supervivanto ĉiuvespere trinkos ankaŭ la glason de la forpasinto. Jen, mi respektas nian voton.

- Laŭdinda, sankta promeso! Vi meritas sincerajn komplimentojn! - diris la kelnero.

Post kelkaj vesperoj la skoto, asidua vizitanto de la taverno, komencis mendi por si nur unu malgrandan glason, eltrinkas ĝin, pagas kaj silente foriras.

- Juna sinjoro, -

rekomencis la kelnero - ŝajnas al mi, ke vi ne plu respektas la solene faritan voton antaŭ via nesubstitebla amiko.

- Ho, jes, jes. Ĉiuvespere mi trinkas la glason de mia brava, heroe pereinta amiko en aerbatalo.

- Kaj vian glason?

- La mian?... Mi estiĝis abstinenculo.

CYDRA

GLOSOJ:

voto - sankta promeso

loantana - malproksima

taverno - simpla manĝejo kaj drinkejo

asidua - konstanta

perei - heroe forpasi en batalo

suspiri - sopiri



Kiril DRAJEV

Konjekto

*Infano eta -
kvinjara bubo -
kutimon havis:
konstante vori
la ungojn siajn.*


*Patrin' zorgema
kaj amoplana
klopodis ade
instigi filon
forgesi nepre
kutimon mavan.
Obstina bubo,
forte spitante,
neglektis ĉiam*

*admonon ŝian
kaj la konsilojn.*

*En ardaĵ streboj
pri la eduko
de sia filo, panjo amanta
inventis ruzan, efikan trompon:
- Se ne forgesos vi ĉi kutimon,
pufiĝos fie la ventro via
ĝis la genuoj.*

*Spitema bubo al si imagis
la tristan bildon: sur korpo minca
ventro ŝvelinta, ventro pendanta
al parto puba ĝis la genuoj.
Abomen' vera!
Fin-fin' humile kaj sen rezisto
obeis bubo.*

Post tempo certa - hazardo stranga -



*per tram' veturis patrin' kaj bubo,
Kaj vid-al-vid de la duopo
moroza sidas graveda damo.*

*Ŝokita bubo tuj rememoris
pri la vorado de siaj ungoj
pri la konsiloj
kaj la grumblado
de la patrino.*

*Demande bubo
la kapon turnas
al sia panjo.
Li streĉe gapas
al la sidanta
graveda damo -
jen al vizaĝo,
jen la kapo,
jen al la jupo,
jen al la ventro...*

*En lian kapon
klarigo venis,
El cerbo lia
konkludo mergis:
diveno estas
por la enigmo.
Ne plu ekzistas
mister' sekreta!
La mirigita, kaj surprizita
graveda damo softe demandis:
- Petola knabo, aminda bubo,
scieme longe kaj tre profunde
vi min observas. Ĉu vi min konas?

Al la sidanta damo graveda
bubo replikis:
- Mi vin ne konas, mi tamen scias
kion vi faris por havi ventron,
ventron ŝvelintan.*

Esperanto savis mian vivon

La 21-an de majo 1940 mi estis en urbeto Aubigny en Artois, kiam alvenis la germanaj soldatoj en tiun urbeton.

Sekvontmatene ili arestis min kaj multajn aliajn civilulojn. Ni devis alĝuiĝi kontraŭ la muron kun levitaj brakoj. Apud mi staris belga esperantisto kaj alĝeriano. Ni interŝanĝis kelkajn vortojn en Esperanto, kiam subite germana gardostaranto alproksimiĝis kaj demandis esperantlingve:

- Ĉu vi estas esperantistoj?

- Jes!

- Nu, tiuokaze mi helpos vin forkuri, ĉar ĉiuj homoj ĉi tie kunigitaj estos mortpafitaj.

Li malproksimiĝis kaj post paso de ĉirkaŭ unu horo, dum oni frapis viron, kiu estis mallevina la brakojn, mi sentis, ke iu tiras min malantaŭen. Mi turnis la kapon kaj rekonis la germanan soldaton, kvankam li estis demetinta sian kaskon.

Li mansignis al nia triopo, ke ni lasu nin fali kaj ni poste tuj rampis al la najbaraj domoj.

Ni pense dankis nian savinton kaj forkuris al la kamparo.

Poste mi eksciis, ke tiun tagon (je la 20-a horo) 98 civiluloj estis mortpafitaj.

A. BAYARD,
Francio

LA MORTO DE BIRDO

Emilijan STANEV

Mi volis rakonti ĝin al vi, dum ni ambaŭ sidis, ripozante post la ĉasado de skolopoj apud la vojo, proksime de la vilaĝeto, kies kortobariloj el nebakitaj brikoj kaj dornoheĝoj, kaŝitaj sub la densaj branĉoj de la salikoj, malaperis en la rubenkolora flamo de l'subiranta aŭtuna suno.

Ĉu vi rememoras tiujn sunsubirojn, kiujn ni vidis ĉiuvespere trembrili per sia fajra pompo ĉe la alia rando de l'arbaro? Kvazaŭ giganta barelo elverŝadus sian ebriigan vinon super la mondon. Rigardante ilin, ni ambaŭ havis la deziron iri tien, kie al ni ŝajnis, ke ni povos trovi alian sunan kaj belegan mondon, kian ni vidis nur en niaj sonĝoj dum la infanaĝo...

Mi forgesis tiam rakonti al vi tiun okazaĵon, ĉar mia atento estis ĉiam ankoraŭ absorbita per la ĵusa ĉasado. La dumtagaj impresoj reaperis en mia memoro: la malseketa arbaro kun sia kuproruĝa foliaro, la kvieta kaj tenera flustrado de la skolopoj, la ĉaspozroj de niaj hundoj, la resonado de la pafoj kaj tiu akra specifaodoro de bruligita pulvo, kiun oni sentas tiel intense en la freŝa aero de l'arbaro.

Kaj krome, ĉu ne estus tre malkonvene paroli al vi pri similaj aferoj hodiaŭ, kiam sur la tuta tero la milito forprenas milojn kaj milionojn da homaj vivoj? Kaj ĉu la morto de birdo, pri kiu mi volas rakonti al vi, povas esti komparata kun la morto de homa estaĵo?

Kaj tamen ŝajnas al mi, ke mi komprenis, kio estas morto ĝuste dank'al tiu malgranda birdo, kiun mi erare mortpafis...

Tio okazis en la fino de la pasinta frosta kaj longedaŭra vintro, meze de la marĉoplana ebenajaĵo ĉiuflanke zonita per krono el montoj, kie ni ambaŭ multfoje embuskis sovaĝajn anasojn.

La tago estis malvarma. Blovis vento. Centoj da migrantaj birdoj pelataj de la forta norda vento konstante alflugis al la periferio de la vilaĝo por serĉi ŝirmon kontraŭ la frosto kaj la malsato. Svarmoj de turdoj kaj sturnoj, skolopoj kun orkoloraj okuloj, vaneloj kun larĝaj funebraj flugiloj, emberizoj kaj turtoj forlasis la ebenajaĵon, portate de la vento. Tiu ĉi tuta birda mondo serĉis kvietan anguleton por iom ripozi, satigi kaj varmigi sin post la longa vojaĝo de la sudo.

Inter la legomĝardenoj de la vilaĝo zigzagas rivereto kun altaj bordoj surkreskitaj per salikoj. Ĝi servis al la birdoj, kiel vojindikilo. Ili transflugis super la arboj kaj alteriĝis sur ĝiaj bordoj, ĉar tie ĉi la vento estis ne tiel forta kaj la grundo ne estis rigida pro la frosto.

Marŝante laŭ la riverfluo, mi levis en la aero kelkajn arojn da sovaĝaj anasoj. La ĉasado estis facila kaj abunda. Ok anasoj el la speco de tiuj, kiujn ni ĉasistoj nomas nigraj, jam pendis sur mia kartoĉujo. Senfortigite de la vento kaj konsumite pro la maldormado, vaginte dum la tuta frosta nokto super la glaciigintaj marĉetoj, ili fluglevis sin de proksima distanco kaj facile fariĝis viktimoj de miaj pafoj.

Ĉirkaŭ la tagmezo de la nordo aperis grizaj nuboj pezaj, plenaj de neĝo. Super la ebenaĵo komencis furiozi neĝblovado. Aro da sovaĝaj anseroj pasis super la rivereto kaj malaperis en la blanka reto de la grandaj neĝflokaj falantaj oblikve al la tero, simile al blankaj rubandoj.

Mi rifuĝis kontraŭ la neĝkirlado en paŝtistan kabanon, kies pajla tegmento susuris super mia kapo.

Post unu horo la vento kvietiĝis. La neĝo ĉesis fali. La firmamento plialtiĝis kaj la ebenaĵo sin sternis blanka, vasta, kvieta kaj pura.

La sukcesa ĉaso, la freŝa ebenaĵo kovrita

de marta malkompakta neĝo, sur kiu estis tiel agrable paŝi kaj kies pureco kvazaŭ penetris en mian animon, vekis ĉe mi senkaŭzan ĝojon, kian oni sentas, pensante pri io belega kaj serena. Mi estis ĝoja iri meze de tiu kvieta kaj blanka silento de la ebenaĵo, aŭskulti la susuradon de miaj vestoj kaj la intermitan frapetadon de mia fusiltubo kontraŭ la metala ringo de la tornistra rimeno.

Restis ankoraŭ du horoj ĝis la vesperiĝo, sed la neĝo plenigis per lumo la trankvilan aeron. Tra la maldika nuba tavolo estis rimarkebla la sundisko simila al lampo ĉirkaŭita de nebulo.

Forlasinte la rivereton, mi ekpaŝis tra la ebenaĵo al la urbo. Mi marŝis preter irigacia kanaleteto plena de neĝa kaĉo.

Malproksime antaŭ mi, kiel verda spegulo, meze de la blanka kamparo vidiĝis granda marĉeto. Kelkaj malaltaj salikoj solece superstaris apude, kaj iliaj nudaj branĉoj apenaŭ spegulis sin en la klara akvo.

Kaj jen, proksimiĝinte kvindekon da paŝoj al la marĉeto, mi subite rimarkis, ke en ĝia mezo staras ia birdo tute senmova, kiel ronda nigra bulo.

Tuj kiam mi haltis, la birdo sin turnis kaj mi vidis ŝian maltrankvile levitan kapon. Kredeble ĝi estis anaso de la speco de tiuj, kiuj nun pendis ĉe mia kokso. La anaso intencis elflugi. Tio evidentiĝis el ĝiaj facilaj, preskaŭ

ne rimarkeblaj movoj plenigitaj de maltrankvila timtremo.

Vi scias, kara amiko, kiel la subite riĉmarkita ĉasaĵo nin igas ektemi pro emocio kaj kapti la fusilon. La sango invadas nian kapon, la ekscitiĝo igas nin reteni la spiron kaj en momento nia tuta atento koncentriĝas nur al la birdo aŭ la besto, kiu staras antaŭ ni. Neretenebla deziro akiri ĝin bruligas nin. Ni tremas pro streĉiteco ne preterlasi la sekundon, en kiu ni devas doni la pafon.

Konsiderinte, ke la anaso povus elflugi tra la branĉoj de la salikaro kaj malaperi for de mia rigardo, mi decidis pafi, dum ĝi ankoraŭ ne flugleviĝis.

Mi direktis la dutuban fusilon al ĝi, kaj kiam la pinto de la pafcelilo tuŝis ĝian malluman korpon, mi premis la ĉanon...

Tra la maldensa fumo mi vidis, kiel la kugletaro ŝprucigis la akvon preter la birdo kaj kiel sur la riverbordo en la neĝo aperis nigraj punktetoj pro la trafoj de la plumberoj. Sed, mirinda afero: la birdo restis en la marĉeto en la sama pozicio, kiel antaŭ la pafado - trankvile kaj senmove. Ĝi eĉ ne ekplaŭdis per la flugiloj, ne eknaĝis dorsomalsupre, ne mergis sin en la akvon por serĉi savon el la morto, kiel farus ĉiu alia vundita aŭ mortanta akvobirdo. Ĝi nur turniĝis al mi kviete kaj malrapide tiel, ke eksimilis denove al ronda bulo.

Mirigite kaj malfide, mi ekpaŝis al ĝi, tenante la fingron sur la dua ĉano, estante preta pafi denove.

Mi travivis ne nur miron, sed ankaŭ

konfuzon, ĉar al mi ŝajnis, ke mi pafis kontraŭ fantomo - nevundebla, staranta ekster la leĝoj de vivo kaj morto...

Proksimiĝinte, mi vidis, ke en la marĉeto staras ne anaso, sed nigra skolopo. Ĝia malhele-griza korpo aspektis sana kaj pura. Neniu guto de sango estis rimarkebla sur la densa plumaro.

La birdo ne moviĝis. Ĝi aspektis plene absorbita per tiu rigida kaj iom mirplena kontemplado, al kiu sin fordonas malsuperaj estaĵoj, dum ili estas trankvilaj kaj ne minacataj de iu ajn danĝero. Mia apudesto faris al ĝi nenian impreson, kvazaŭ mi ne ekzistus por ĝi, kvankam mi staris jam sur la bordo de la marĉeto, kaj la distanco, kiu disigis nin, ne estis pli granda ol du paŝoj.

Ĝia eta kapo belforma kaj brile-nigra, sur kiu montriĝis blanka kresteto, estis direktita antaŭen, kvazaŭ ĝia rigardo pasus super la blanka ebenaĵo fiksita sur iu punkto trans la horizonto. La birdo ŝajnis esti tute koncentrita al io senfine grava, kio potence absorbis ĝian atenton kaj nerezisteble katenis ĝin. Tiu ĉi malgranda estulo, kviete flosanta sur la surfaco de la akvo, spiris glacian trankvilecon kaj plenan indiferecon pri ĉio cetera.

Imagu, ke vi povus vidi de malproksime tiun ĉi nekredeblan bildon: la ĉasisto kaj la sovaĝa birdo - ambaŭ starantaj tiel proksime unu apud la alia - la homo miranta, ne komprenanta, kaj la ĉasaĵo plene indifera al la ĉeesto de sia plej terura malamiko, kaj ĉio ĉi meze de tiu neĝblanka, kvieta ebenaĵo, en kiu la neĝŝtormo lasis post si

nur trankvilon kaj silenton. Ĉu vi ne ekkredus, ke en tiu horo sur la tero okazis la granda miraklo, kiun promesas al ni la evangeliaj legendoj?

Ankoraŭ kelkaj sekundoj, kaj mi sentis, ke mi ne plu povus elteni antaŭ tiu ĉi enigmo. Mi volis krei, svingi la manon, aŭ etendi ĝin por kapti tiun etkorpan, nigran estaĵon, kiu ne timis min, kaj kies trankvilo aspektis tiel majesta.

Kaj jen, ĝuste en la momento, kiam mi estis preta envadi la akvon, la birdo ektemis. Ĝia longa kolo fleksiĝis, la kapo retiriĝis al la dorso kaj la tuta korpo skuiĝis en konvulsia impulso, kvazaŭ dezirante konservi ion, kion ĝis tiu ĉi momento ĝi retenis en sia brusto. Poste ĝi malrapide eknaĝis al la peceto de glacio troviĝanta antaŭ ĝi kaj etendante la kolon, ĝi premtuŝis la malvarman solidaĵon per sia perlamote blanka beko. Pli kaj pli suferplene kaj pli forte ĝi enpikis la bekon en la glacieron, kvazaŭ dezirante per tio venki sian grandan doloron. Subite ĝia korpo malstreĉis sin, la malgranda membraneto duonfermis la nigrajn okulojn kaj la birdo turniĝis surdorse. Ĝi estis morta.

Nur tiam mi divenis, kiu forto venkis la timon de tiu estaĵo. Ĝi estis mortpafita. Kaj kiam la plumbograjno estis penetrinta ĝian bruston kaj ĝi sentis la alvenon de la morto, ĝia tuta atento estis absorbita per la proksimiĝo de tiu grava momento. Ĝi ne havas tempon okupiĝi pri mi, ĉar ĝi pretiĝis renkonti sian finon... Dum tiuj ĉi kelkaj minutoj eble ĝia eta animo sentis parton el

tiu ĉagreno, kiun ĉiu viva estaĵo sentas antaŭ la sojlo de la morto.

Longe mi rigardis pensabsorbite la senmovan kadavron de la birdo, flosantan en la verda akvo.

Kiam mia rigardo denove renkontis la blankan montokronon kaj la kvietan serenecon de la ebena vastaĵo, ŝajnis al mi, ke tiu eta vivo, kiun mi ĵus forprenis, ne malaperis sen postsigno. Simile al malgranda guteto, ĝi pasis en la oceanon de la granda kaj eterna potenco, kiu naskas la vivon... Kaj mi komprenis, kial ni homoj iufoje vidis en la morto certan belecon kaj kial ni bazas sur ĝi eĉ niajn esperojn. En tiu transiro el la ĉitiera en la transan mondon, en tiu ĉi eterna ciklo, pri kiu parolas filozofoj kaj religioj, nia menso ĉiam malkovris la senmortan principon de la vivo kaj ĉiam ĉerpis novajn fortojn por la spirito...

Antaŭ ol daŭrigi mian vojon, mi elakvigis la kadavron de la birdo kaj metis ĝin sur la neĝon, impulsate de la deziro konservi ĝin kontraŭ putrado kaj malbeliĝo.

Jen kion mi volis rakonti al vi en tiu mirinde bela aŭtuna tago. Vi estas ĉasisto, kaj vi certe ne riproĉos min pri la sencela mortigo de tiu birdo. La besto estas necesa al ni por leviĝi per ĝi, tamen kiam oni scias, kion prezentas la morto, la kredo pri la senmorta principo de la vivo haltigas la manon kaj plenigas la animon per lumo kaj amo.

Tradukis: Simeon M. SIMEONOV

SUPERI ORIGINALON: ĈU EBLE?

Bonokaze mi estiĝis esperantisto en Odessa, nigramara urbo, kie loĝis unu el la grandaj sovetiaj Esperanto-tradukistoj, Sergio Rublov. Iufoje en 1961 mi pro ne-memoras kio trafis al lia loĝejo. La mastro regalis min per ege interesa konversacio pri diversaj esperanto-problemoj kaj pri la problemoj de tradukarto. En la fino li proponis legi kelkajn tradukojn al Esperanto el Puŝkin-poezio. Mi, sidante en la mola fotelo, fermis la okulojn por pli bone percepti la ŝatatan poeton en alia (nerusa) lingvo. Tiam mi jam perfekte posedis la lingvon. Ekfluis la konataj strofoj. Jes, tio estis Puŝkin, ruse intima Puŝkin. Puŝkin, centfoje Puŝkin! Mi scipovis abstraktiĝi de la rusa lingvo, sed post la lego al mi ŝajnis, ke mi aŭdis ĉion en la rusa lingvo. Fidela, brila traduko! Eĉ pli, en kelkaj lokoj al mi ekŝajnis, ke la recitanto diris eĉ pli bellingve, pli esprimive ol Puŝkin mem. Ĉu? Ĉu eblas diri pri la samo pli bone ol Puŝkin? Tion diri al iu ruso signifas anonci la propran frenezigon. Kompreneble mi ne malkaŝis

tion tra pluraj jaroj. Sed post tiuj pluraj jaroj al kelkaj fidelaj samideanoj mi konfesis la subjektivan percepton: Puŝkin en Esperanto-traduko de Rublov kelkloke estas pli belpoezia ol en la rusa. La amikoj ne severumis al mi, male, ili agnoskis, ke ili sentis (malofte sed tamene) kelklonan samon en iuj elrusaj tradukoj.

De antaŭ kelkaj jaroj mi atentis similan fenomenon en publikaĵoj de mia ŝatata Literatura Foiro. Jen kion jam havas mia sliparo:

La tragedio de l'Homo (tradukis K. Kalocsay).

...*La frapanta fideleco al la originalo, la simpla, sed trafa esprimmaniero, la poezian ĉarmon konservanta interna forto de la traduko, kiu eĉ nuancojn ne deturnas, tiom surprizis min dum la unuafoja legado, ke reteni la ekkriojn de l'admiro mi ne povis. Mi ja bone konas la originalon, kies Luciferon jam kelkfoje mi estis ludanta sur scenejo, sed mian admiron, sinceran entuziasmon vekis la klareco de la traduko, kiu faras la verkon pli komprenebla kelkloke, pli ĝuebla arte ol la originalo mem...* (Julio Baghy, *Literatura Foiro* 83, p.

16).

La baptado de Caro Vladimir (el la ĉeĥa - Tomaŝ Pumpr). *Mi laŭtleĝis la duan kanton, kaj eksplodis ondo de aklamado. Oni hurlis, ke ĝi egalas la originalon, iu febra animo eĉ kriis, ke ĝi superas la originalon!... En Budapeŝto ĉi-jare mi parolis aparte al du kleraj ĉeĥoj, viro kaj virino, kaj ambaŭ jesis tiun entuziasman krion de 1949: ke la traduko nepre superas la originalon; ne nur ĉar Pumpr enportis eĉ pli da mezrimoj, ol kiom skribis Havliček, sed entute. ...la paradokso de Auld fariĝis vero: "La baptado de Caro Vladimiro" tradukiĝas en la ĉeĥan nur kun perdo. (Reto Rossetti, *Literatura Foiro* 84, p. 11-12).*

Intervjuo de la slovaka rok-grupo Team:

"Ĉu vi trovas Esperanton plene taŭga roklingvo?"

"Ni estas surprizitaj. Ni ne atendis, ke ĝi estas tiel bone kantebla. Pavol supozis ĝin eble simila al la itala, sed ĝi superis ĉian atendon. En kelkaj momentoj la Esperanta versio ŝajnas al ni pli bona ol la slovaka,

senblage." (LF 116, p. 27)
Asteriks la Gaŭlo, traduko
el la franca:

...la Esperanto-versio ne
povis utiligi similan rimedon
pro la fakto, ke por tiu celo
Esperanto devus havi econ,
kiu mankas (intence) al ĝi:
regione kaj socie diversajn
lingvotavolojn. La traduka
rondo sukcesis per pli sprita
solvo, kiu eĉ superas la
originalon. (Hans
Grasseger, LF 120, p. 50).

La fenomeno traduke
superi la originalon estas tute
konata, ĝi dependas de la
tradukista talento. Sed ke tio
eblas ankaŭ en Esperanto,
necesus iel pruvi per
traduk-lingvistikaj
eksperimentoj, ĉar la
neesperantista publiko ne
kredas tion.

Intertempe mi proponas
komune kolekti la
subjektivajn impresojn
(citaĵojn pri la konkretaj
tradukoj) pri la traduko-lokoj,
kie Esperanto-versio superas
la originalon. Mi proponas
ĉion sendi al mi, kaj fojfoje
mi publikigos la kolekton.

Mia adreso estas: A.
Gonĉarov,
ul. Sĉukina 3/5-32,
Moskva, 119034, USSR.

El "Literatura foiro" -
12/1990

El nia leterkesto

LETERO EL UKRAINIO

Altestimataj gesamideanoj!

Dank'al via revuo mi fariĝis tre fama "kuracisto" en mia urbo kaj provinco. Antaŭ unu jaro vi finis la aperigon de fragmentoj el la libro de Krasimira Stojanova pri Vanga. Mi tuj tradukis ilin ukrainlingven kaj nia provinca ĵurnalo "Вільне життя" ("Libera vivo") publikigis la tradukon. Poste en la Redakcio la telefono ne ĉesis sonori, dezirantoj resaniĝi vizitis min en mia laborejo. Ĉiuj bezonis iun helpon kaj por mi estis tre malfacile klarigi al ĉiuj, ke mi estas nur tradukinto. Tio daŭris preskaŭ duonjaron. Tiu senprecedenta (por mi) fakto ankoraŭfoje pruvis tiun rimarkindan rolon, kiun nun ludas Esperanto - lingva ponto inter diversaj lingvoj, kulturoj, sciencbranĉoj. •Bedaŭrinde nur malmulte da homoj komprenas tion.

Kaj plia interesa novaĵo. En nia urbo antaŭ unu jaro estis elektita vera demokratia urba konsilio. Nun ĝi planas ŝanĝi nomojn de diversaj stratoj kaj placoj, por ke la urbo havu sian propran neripeteblan vizaĝon. Nia E-klubo "Spinofloro" proponis nomi straton "Miĥajlo Ĵurkiv". Li estis fama ukraina esperantisto, tradukisto, filozofo, aŭtoro de la unua lernolibro de Internacia Lingvo por ukrainoj (eldonita en Ternopil en la jaro 1907). La lastajn jarojn li pasigis sur tiu strato, kiu nun portas la nomon de rusa kuracisto Pirogov. La komisiono pri nomŝanĝoj proponis, ke tiu strato akceptu la nomon de Ivan Puluj - la unua inventisto de rentgenaj radioj.

Ni petas subtenon de via redakcio, de ĉiuj legantoj de "BE". Favorajn reagojn bonvolu sendi al la urbestro de Ternopil s-ro V. Nehoda, 282001 Ukrainio, Ternopil, ab. kesto 83, USSR

Viktor PAJUK,
konsiliano de la
Ukraina E-Asocio

KREANTO KAJ NATURO



"Laŭdon al vi, bulgaro, kiu estas dotita per okuloj, manoj kaj koro por vidi grandegan riĉaĵon de la naturo kaj atribui al ĝi vivecon en siaj kreaĵoj".

El la eŝo de ekspozicio "Donaco de la naturo" de Stefan Todorov

Ĉu ekzistas homo, kiu ne amas kaj ne estimas la naturon? Ĉiuj homoj pli-malpli inspiriĝas ĉe la kontakto kun ĝi. Sed nemultaj rimarkas en ties ordinaraĵoj formoj nekutimecon, kaŝitan sorĉecon kaj misterajn variojn?

Unu el tiuj veraj feliĉuloj estas esperantisto Stefan Todorov - talentita lignoskulptisto el v. Iskrec, Sofio-departemento. Li kreas malgrandajn, lignoplastikaĵojn, reproduktante naturajn formojn. La aplika lignoarta plastikaĵo kiel ĝenro proponas riĉajn esprimeblecojn, koncentritajn en malgrandaj formoj. Ĝi estas delikata esprimo de la serena vizio kaj pacama rilato de la aŭtoro al la naturestaĵoj.

La verkoj de Stefan Todorov estas emocia reakcio rezulte de komunikiĝo kun la naturo. Kaj la ligno "ekparolas" sub liaj lertaj manoj. Per sia akra senso de artisto, Todorov trovas la plej ĝustan esprimmanieron de la lignoformo:

- Ĉu vi ne vidis? Tio ja estas birdo!... - ekkriis li preteririnta indiferece apud soleca lignoradiko en la grandega parko de vilaĝo Iskrec.

Grupo de sofiaj esperantistoj, organizitaj de E-kulturdomo vizitis la sanatorion, kie laboras Stefan Todorov. Ni vizitis ankaŭ la ekspozicion "Donaco de la naturo", aranĝitan nun en lia

domo en Iskrec, post sukcesa gastado en la kulturdomo "N. Vapcarov" - "Ljulin", Sofio.


La etoso en la domo de Todorov estas trankvila, agrabla kaj gastama.

- Mi naskiĝis en la koro de Balkan-Montaro kaj denaske komunikiĝas kun la naturo. Mi estas sentimentala, mi pentras kaj skribas versojn. Mi okupiĝas pri Esperanto kaj opinias, ke per ĝi mi trovos multe da amikoj-naturŝatantoj...

La vivpozicio de Stefan Todorov difinas lian kredon: la artaĵo devas esti proksima al la naturo, sed humanigita kaj idealigita de la artisto.

La kreaĵoj de Todorov estas esprimo de lia persone motivita estetiko: "Kontakto de la homo kun la naturo ne estas nur kontemplado antaŭ ĝia beleco. La naturo mem ekgvidas nin laŭ la arbaraj vojetoj kaj invitas nin atente rigardi... Tio - malsimpla muziko de linioj, koloroj kaj siluetoj liberigas la homon de la ĉiutageco kaj impulsas lin libere serĉi la spiritan perfektigon..."


Vere la arto de Stefan Todorov montras profundan lirikecon kaj romantikan senton. La ĉarmo de liaj kreaĵoj radikas en la sana



Malkoincido



Pego



Lutro

montar-spirito, en la memsento de montaro kaj naturo, en kies serenecon kaj riĉecon estas penetranta la aŭtoro. Liaj artaĵoj mem estas finitaj kaj neagresemaj, sed samtempe ili donas eblecon al la rigardanto konscii kaj travivi ilin pense kaj emocie. Tiamaniere la verkisto delikate allogas la rigardantojn al neordinara "kunaŭtoreco".


La malgrandaj skulptformoj koncentras multe da tenereco kaj sincereco. Sen troigo kaj ekstravaganco Todorov transigas al ni siajn senton kaj humoron per la plastikaj "Kapreolo", "Tritono", "Nesto", per la komponicioj "Preterpaso", "Maskoj". Arda elano al lumo kaj feliĉo estas "Impeto", "Supren", "Birdo" k.a. Multaj ikebanaj estas plenemociaj komponaĵoj el naturlignaj formoj, koloroj kaj helombroj... Iuj profiloj impresas per sia kaŝita dramo, sed kiel tuto plimultas la pastoralaj, panteismaj kontemploj.

En la senescepte psikologiigita nuntempa mondo la arto de Stefan Todorov efikas forte kaj vivgrave kiel spirite valora kaj persone travivita dialogo kun la naturo.

La ekzistantaj interrilatoj homo-naturo-arto-Esperanto helpas lin enla kreado. Ligante sian kredon kun la ideo de Esperanto, Todorov faras tiujn interrilatojn praktike senlimaj.

Fine - kun nobla envieto pro la feliĉaj kapabloj de Stefan Todorov mi deziras al li pli kaj pli da inspiro kaj stimulo por kreado. Per sia majstreco kaj amo li rivelu, konfirmu kaj prediku la belecon kaj vivecon de la naturo.

Katja VUČKOVA



**Enlanda
movado**

Jubileo de idealismo

La nuntempa socio estas dividita je du kategorioj da homoj: unuj strebas eltiri bonfavoarojn por si kaj siaj proksimuloj, aliaj ofereble limigas sin por doni de si kion oni povas al la socio. La Esperanto-movado estas movado de idealistoj. Ties organizoj donas preskaŭ neniajn favorojn kontraŭ la membrado. Pro tio ilia kresko kaj refreŝigo ne estas tre vigla.

Aprile j.k. la membroj de la Trojana societo "Balkana Stelo" celebris okaze de 60-jariĝo sian elstaran membron Ivan Liŝev, kiu apartenas al la dua - idealista kategorio, ĉar dum preskaŭ 30 jaroj li fordonis siajn fortojn, tempon, kapablojn por la E-movado.

La prezidanto de la kunveno Ganka Georgieva malfermis la kunvenon proponante la parolon por gratulo al la veninta speciale por la jubileo veterano de la movado kaj membro de la Komitato de BEA Violin Oljanov. Li gratulis la jubileulon nome de la estraro de la Asocio, skizante lian utilan kaj rezultodonan aktivecon. Ivan Liŝev plurajn jarojn aktivis kiel membro de la Centra Estraro de BEA, gvidis kursojn en diversaj lokoj de la lando, rezulte da kiuj li kreis multe da bonaj esperantistoj, klopodis por la organiza stabiligo de la societo.

Pro la bonaj rezultoj de liaj kursoj al Liŝev estis atribuita honortitolo "Rekonita lektoro". Dum la kongreso en Sofio en 1985 s-ano Ivan Liŝev estis proklamita "Honora membro de BEA" (la plej juna inter ĉiuj honoraj membroj). La lasta kongreso en Ŝumen reelektis lin membro de la Komitato de BEA.

Fine Oljanov tralegis gratuladreson al la jubileulo far Petar Todorov, prezidanto de BEA kaj kroĉis al li honorsignilon.

La prezidanto de societo "Balkana Stelo" Lalju Lalev gratulis la jubileulon esprimante dankon pro lia konstanta aktiveco dum jardekoj kaj bondezirante sanon, vignecon kaj ankoraŭ multajn jarojn da aktiveco favora al la Esperanto-movado. La jubileulo ricevis donacojn de la Asocio kaj la loka societo.

Post la oficiala celebrado okazis dancoj kaj amuzado.

VIO

Esperantista kvartalo

Ne hazarde multaj ŝumenaj esperantistoj diras, ke la malnova kvartalo "Dobruĝa" nun estas ne nur unu el la plej belaj en Ŝumen, sed ankaŭ ke ĝi estas kvartalo de aktivaj esperantistoj.

Tie nun loĝas tre proksime unu al la alia kelkaj esperantaj familioj, kiel tiuj de Veska kaj Dimitar Minĉev, Nikolinka kaj Cvjatko Stojanov, Liljana kaj Ivan Smokov. Jam multajn jarojn ili aktive partoprenas en la loka E-agado kaj tiu de BEA, estis kaj kelkaj ankoraŭ estas estraranoj de "Vekiĝo". Kaj familio Smokov unuanime estas proklamitaj "Honoraj membroj" de la societo. En la kvartalo loĝas ankoraŭ inĝ. Stefan Georgiev - nuna vicprezidanto de "Vekiĝo", Nedelĉo Stefanov, Ivan Kasabov kaj aliaj. Ili ĉiuj estas konataj ne nur kiel bonaj esperantistoj, sed ankaŭ kiel bonaj najbaroj, pacamaj homoj, sociagantoj. Tie vivis antifaŝisto Canko Karaspasov - unu el la plej flamkoraj ŝumenaj esperantistoj en la pasinteco. La strato kie estas lia naskiĝdomo, antaŭ 10 jaroj estis baptita je la nomo de d-ro Zamenhof kaj nun estas konata al ĉiuj ŝumenanoj.

Cvjatko TODOROV

Kvankam la cirkonstancoj ne favoras la agadon en la spirita direkto, E-societo "Hristo Kozlev" - Polski Trâmbeš, daŭre aktivas. Tion pravas la sukcesa jarkunveno, okazinta la 12-an de aprilo k.j. Kunvenis ĉ. 50 gemembroj por pridiskuti la nunan staton kaj antaŭstarigi novajn celojn. Restas la esperiga fakto, ke la plimulto de la anaro estas junaj aŭ preskaŭ junaj verdstelanoj, inkluzive 10 familiajn parojn. Ekzistas sufiĉa kaj laborema aktivularo, preta kontraŭbatali ĉiajn barojn kaj problemojn.

Ni komencas la novan organizan jaron en novdisponigita klubejo kaj kun renovigita estraro - ĉekape kun nova prezidanto Ilija Ivanov kaj gemembroj: Donĉo Minĉev, Emilija Stanĉeva, Jordan Velikov, Mariana Todorova, Rumjana Ilieva kaj Stojan Donĉev.

Malfacile estas ekskursi eksterlanden. Ni decidis kompensi tion per aktivigita korespondado, kleriga, ekologia kaj distra agado, per pli aktiva kaj multnombra partopreno en enlandaj E-iniciatoj.

Poste, ĝis malfrua nokto, en la vasta halo de la Patrolanda Asocio oni deklamis, aŭskultis melodiojn kaj dancis.

Rumjana ILIEVA

La mondo de nova angulo

Kvankam la nunaj enlandaj ekonomiaj kaj aliaj malfacilaĵoj kreas multajn zorgojn kaj streĉecon ankaŭ al la ŝumenaj esperantistoj, la novaj liberaj kondiĉoj por korespondado, reciprokaj gastadoj, ligoj kun la tuta mondo malfermas novajn eblecojn. Nun ili povas rigardi la mondon de nova angulo, plene kontribui por la alproksimiĝo de la homoj tra la mondo, ne per rekomendoj de la Centra Estraro de BEA, sed laŭ propra konscienco disputadi libere pri ĉiuj ilin interesantaj demandoj. Nun en la societo ĉekape kun la aktiva KEK-grupo, kiuj regule ricevas kaj legas "Internaciisto"-n, oni restarigas la agadon de SAT malpermesita post la 9-a de septembro 1944. Tiu laborista organizado en la pasinteco havis multajn adeptojn en Ŝumen. Ĝiaj aktivuloj estas la progresemaj ŝumenaj esperantistoj Ĉanko Karaspasov, Ljuben Kaŝĉiev, Atanas Bojaĝiev k.a. Jam oni ricevas kaj libere legas "Sennaciulo"-n - organo de SAT. Kun intereso oni akceptas la agadon de Internacia Esperanta Biblio - misio, kies centro estas en Londono. Kelkaj membroj jam aliĝis kaj senpage ricevis la Biblion en Esperanto. Nun ili ĝin pristudas, regule respondas al la sendataj studfolioj kun demandoj. Oni povas ankaŭ renovigi la agadon de la ŝumenaj esperantistoj-vegetaranoj, kiu en la pasinteco estis konata.

Cvjatko STOJANOV

"Bulgario ĉiam okupos gravan lokon en nia memoro..."



Dum pli ol kvar monatoj karaj gastoj de nia lando estis juna kaj simpatia kanada E-paro Danielle Bédard kaj Yvon Roux el Montrealo, Kebekio. Ŝi - instruistino en infanĝardeno kaj aŭtorino de pedagogiaj verkoj por instruistoj kaj infanoj (de franclingvaj lernolibroj kvarvoluma "La eta ruĝa ĉapeleto" kaj de kantaro "Ĝis revido, mia lacerto!" akompanita de kasedo). Li - ekonomiisto laboranta en kinofirmao. Ambaŭ volonte renkontiĝis kun nia reprezentanto Evgeni GEORGIEV kaj estis afablaj respondi al jenaj demandoj:

EG: Kiel vi eklernis la Internacian Lingvon? Rakontu pri la E-agado en via urbo?

YR: Mi memstare eklernis Esperanton, ĉar en Kebekio ne estas kursoj. Kiam mi venis al IEK-Pisanica, mi ne povis paroli.

Tie mi eklernis Esperanton en duagrada kurso kaj poste mi bone ekparolis.

DB: Antaŭ du jaroj mi komencis lerni la Internacian Lingvon. En lingvoekspozicio mi vizitis E-budon kaj prenis folion de unua leciono de perpoŝta E-kurso, kiu konsistis el 10 lecionoj. Poste mi vizitis E-klubejon en Montrealo. Mi sola eklernis la lingvon, sed baldaŭ konstatis, ke mi komprenas, sed ne povas paroli ĝin. Vere mi ne havis oftan praktikadon. Mi ĝenis min paroli. Por tion superi, mi ekdeziris varti la infanojn de mia amikino, kiuj scipovis Esperanton. Mi rakontis al ili legaĵojn kaj legis teatraĵetojn. La infanoj uzis simplajn vortojn en siaj interparoloj kun mi kaj mi multon lernis de ili.

Mi komencis viziti regule la E-klubejon en mia urbo, en kiu la esperantistoj kunvenas foje monate. Ili estas precipe junaj familioj kun siaj infanoj kaj studentoj.

EG: *Viaj impresoj pri la E-instruado en Bulgario?*

DB: Por ni la maniero de instruado en IEK - Pisanica, estis granda surprizo. Unue ni ŝategis partopreni tiujn kursojn, ĉar en Kebekio ne estas E-kursoj. Tamen baldaŭ post nia eniro en la klasĉambrojn ni konstatis, ke en viaj kursoj la klasaranĝo kaj etoso estas tute aliaj. Ĉe ni la atmosfero estas pli serena kaj senpera - oni sidante respondas al la instruisto, krome parolas eĉ kiam la instruisto faras lecionon, ŝercas inter si. La lernantoj kaj studentoj en Kanado estas en amikaj rilatoj. Ĉe vi oni ekstaras, kiam la instruisto starigas demandon kaj ordinare ĝenas sin. Oni estas ĉe ni pli aktivaj en klaso, kaj krome la kanadaj lernolibroj estas pli praktikaj ol la viaj. Ni ne multe parolas kiel fari ion, sed simple tuj faras ĝin. Ni certe havas iujn mankojn, sed sendube estas fortaj en la praktiko.

Antaŭ nia ekveturo ni opiniis, ke en Pisanica ni partoprenos en feriaj E-kursoj, sed fakte devis frekventi vere intensajn lecionojn, en kiuj oni vaste instruis gramatikon. Kion fari, ni iom post iom alkutimiĝis kaj sukcese finis ilin - mi la triagradan kaj Yvon - la duagradan.

EG: *Ĉu vi vojaĝis post la E-kursoj tra Bulgario? Ĉu vi kontaktis esperantistojn?*

DB: Jes, ni rondveturis preskaŭ vian tutan landon. La bulgara naturo tre plaĉis al ni. La

montaroj restos por ĉiam en nia kapo kaj koro. Rodopi-montaro ĉiam ŝajnis al mi kiel dekoro, kvazaŭ vere ne ekzistus aŭ estus pentrita en libro aŭ estus en iu filmo pri Drakula. Malgraŭ la streĉa lernado ni ĝojis, ke ni venis en Bulgarien. Estis malfacile, sed en ni restis belegaj rememoroj. Ni akiris ĉi tie multajn amikojn dum la E-kursoj en Pisanica.

YR: Laŭ ilia invito ni vizitis multajn urbojn - Vraca, Plovdiv, Jambol, Ĥaskovo, Burgas, Sliven, Gabrovo, Veliko Tŕrnovo, Sviŝtov, Trojan. Krome ni estis en Baĉkovo-monaĥejo kaj sur Vitoŝa-montaro.


DB: La sekvan fojon mi dezirus veni al Ŝiroka Lŕka kaj mi ŝatus lerni ludi sakfluton en la tiea lernejo pri popolinstrumentoj.

EG: *Viaj opinioj pri la bulgaraj esperantistoj?*

DB: Dum nia jam kvarmonata restado en via bela lando ni ĉiutage parolis Esperanton. Ĉie oni akceptis nin tre gastame kaj niaj gastigantoj tre ĝojis paroli kun ni en la Internacia Lingvo. La akceptado fare de la bulgaraj esperantistoj estis tre kortuŝa, tre agraba kaj amika. Mia koro restos por ĉiam ĉi tie. Bulgario ĉiam okupos gravan lokon en nia memoro. Tiom multe da homoj ni ekkonis, tiom multe da vidindaĵoj ni vizitis dum nia longa restado. Plej longe ni estis en Sofio ĉe la tre gastama samideanino Filka Lazarova, en kies loĝejo ni sentis nin kvazaŭ hejme.

YR: Por ni estis granda travivaĵo persone ekkoni la politikan situacion en via lando kaj eĉ mern sperti ĉiutage la ekonomiajn malfacilaĵojn. Ni ĝojis vidi ĉion per siaj propraj okuloj, sed ne spekti ĝin en la kanada televido.

DB: Nin agrable impresis, ke ĉe vi multaj establaĵoj estas nomataj "Esperanto". Ekzemple ni vizitis montodomon "Esperanto" sur Vitoŝa-montaro kaj estis en la samnoma restoracio en Sofio. Kvankam la laborantoj tie ne parolas la Internacian Lingvon, tiuj objektoj havas grandan propagandan efikon. Vere tiu praktiko estas vere imitinda, ĉar tiumaniere multaj homoj ĉiutage ekscias pri Esperanto kaj pri ties humana ideo. Bedaŭrinde ĉe ni en Kebekio kaj entute en Kanado oni nenie povas vidi surstrate la nomon de nia kara lingvo.



Deziras korespondi

BULGARIO

VENETA SPASOVA (43-jara oficistino) - 7200 Razgrad, ul. "Lajpcig" 96A - kun ĉi pri muziko kaj poezio.

PAVLINA IVANOVA (20-jara studentino) - 9300 Dobrič, ĵ.k. "Druĵba"3, bl. 33/II, ap. 15 - kun ĉi pri teatro, muziko.

GELERNANTOJ (9-14 jaraj) - 5250 Svištov, ul. G. Matev 10, Infana grupo - kun ĉi pri ĉi.

TANJA DRALĈEVA (16-jara lernantino) - 6100 Kazanlâk, ul. Gladston bl. 31, vĥ. II, ap. 28 - kun gelernantoj el ĉi pri muziko, kol. bk kaj kalendaretojn.

ĈEĤOSLOVAKIO

JANA ŠVIRGOVA (17-jara studentino) - str. Mlynska II, ĉ. 4, 69151 Lanzhot, ĈSFR - kun ĉi pri historio, literaturo, turismo.

GERMANIO

D. PETER (32-jara) - 8200 Rosenheim, Leitzachstr.-Wohncont. 17 - kun bulgaraj esperantistoj pri vojaĝoj kaj fremdaj lingvoj

NIGERIO

YEMI AWOTUNDE (30-jara instruisto) - Ajara Grammar School, P.O.Box 19, Lagos State - kun ĉi pri ĉi.

POLLANDO

CZESLAW KUREK (30-jara) - PL-39-200

Debica, ul.Tuwima 5m 110 Tarnow - kun ĉi pri turismo, sporto.

HALINA CHARKIEWICZ-PISC (42-jara instruistino) - PL-78-100 Kolobrzeg, ul.Ratuszowa 5/14 - kun ĉi. pri turismo, literaturo, filmarto.

MICHALEK DAGMARA (13-jara) - PL-58-200 Dzierzoniow, Os Rozane 42 c/6 - kun ĉi pri bestoj, turismo, literaturo.

Familio HALINA PACWA/CNIK - P.O.Box 422, 00-950 Warszawa - kun esperantistinoj el Bulgario pri muziko naturo, azia kulturo.

SOVETUNIO

IGOR LUKAŠEVIĈ (55-jara) - SU-340020 Doneck-20, ul. Abakumov 87, kv.32 - kun samaĝuloj pri literaturo, vojaĝoj, ŝako, kolektas bk de ĉefurboj.

SVETA JURKOVA (17-jara) - SU-440061 Penza, ul. Lunaĉarskogo 7-101 - kun ĉi pri muziko, sporto, kolektas pk kaj kalendaretojn.

ZIVILE STANKEVIČIŪTE (16-jara) - Litovio, Traku raj., 234220 Vievis, Zveju 40 - kun ĉi pri ĉi.

VALENTINA ARĤIPOVA (48-jara instruistino) - SU-353664 Krasnodarskia reg., Ejsk, v. Voroncovko, ul. Sverdlov 5 - kun ĉi pri ĉi.

MARINA RAKOVA (27-jara) - SU-173025 Novgorod, ul. Nehinskaja d. 22/3-20 - kun cl. pri turismo, dancoj, rajdado, libra raraĵo.

KIO, KIAM, KIE

La 28-ajn Baltajn Esperanto-Tagojn organizas Estona Esperanto-Asocio en Tartu, de la 8-a ĝis la 15-a de julio 1991.

Ĉefa temo: Humanismaj edukado kaj kulturo - bazoj por la demokratia sociordo.

Por aliĝo kaj pliaj informoj turnu vin al: Estona Esperanto-Asocio, Olevimägi 12, 200101 Tallinn, Estonio.

KONKURSO

E-kulturdomo - Razgrad, anoncas literaturan konkurson pri originala E-poezio kaj humuro, kies rezultojn oni sciigos enkadre de Esperantista Krea Renkonto "Abritus" de la 15-a kaj 16-a de junio 1991 en urbo Razgrad.

Ĉiuj aŭtoroj esperantistoj kaj simpatiantoj estas invitataj

partopreni la konkurson kaj la renkonton.

Partoprenkotizo: 45 lv. (Inkluzivas: vespermanĝon, matenmanĝon, tranokton en hotelo (tri ŝteloj) kaj viziton al vidindaĵoj).

La sumojn sendu al: Razgrad, str. "G. Dimitrov" EK-3, Esperantski dom za kultura. Por pliaj informoj: tel. (084)3 26 94.



Aforismo de la numero

Kiam ekblovas nova vento, unue komencas kapjesi la malplenaj kapoj.

Emil Krotki,
rusa sovetia poeto-satiristo

DIAGONALOJ

Dekstren: 1. Brazila Esperanto-eldonejo. 2. Centra, esenca parto de io. 3. Nutromaniero, obeanta difinitan regularon. 4. Grenplanto simila al sorgo. 5. Sorĉarto, ekzorco. 6. Sudamerika lando.

Maldekstren: 3. Elstara osteto en makzelo de homo. 4. Arbeto kun ĉiam verdaj folioj. 5. Esprima aspekto de la vizaĝo. 6. Vintra vesto. 7. Korpuso en la antikva Romana armeo. 8. Lando en Proksima Oriento.

Cvetan MANOJLOV

Noto de la Redakcio: Ni atendas viajn solvojn ĝis la 15-a de julio k. j. La rezultoj estos publikigitaj en n-ro 8/91.

Krimenigmo


LA ROMPITA VAZO

- Hieraŭ mi revenis el mia laborejo iom pli frue ol kutime. Jus mi eksidis ĉe la tablo por vespermanĝi, kiam en la ĉambro de mia edzino io falis. Mi galopis tien kaj vidis la antikvan vazon kuŝanta sur la planko. Tiun vazon mia edzino tre ŝatas. La vazo estis rompita. En tiu momento el la ĉambro forkuris iu homo. Mi postkuris lin. Sed kiam mi estis sur la strato, miaj okulvitroj tuj ekŝvitis. Vi ja scias, ke nun la vesperoj estas malvarmaj. Mi stumblis je la rastilo, falis kaj la nekonato malaperis de mia rigardo. Mi multe petas vin malkaŝi la krimulon. Estas evidente, ke li provis forrabi mian domon. Krom tio kiel mi povas klarigi al mia edzino - kaj ŝi hodiaŭ revenas el la loĝejo de siaj gepatroj - kiamaniere ŝia vazo rompiĝis?

- Mi ne povas kompreni, kial vi, s-ro Valdemar, tiom multe timas vian edzinon. Jen, vi provas trompi min, parolante pri iu ŝajna krimulo, kaj estus multe pli bone, se vi simple rakontus al ŝi ĉion, kio okazis.

Kial inspektoro Varnike rifuzis esplori tiun incidenton?

El la bulgara: Nikola NIKOLOV



Paŝtante

ŝafan

gregon

Teksto: Ivan Vazov

Muziko: xxx



- | | |
|---|--|
| 1. Paŝtante ŝafan gregon,
en vasta ĉi kampar'
mi estis kontentega
ĵen eĉ sen havaĵar'. | 3. La tempo ne sufiĉis
kun mia bunta ŝalm',
neniam pli feliĉe
mi dormis, manĝis jam. |
| 2. Dum brilis la stelaro,
kun ĝi mi estis for
kaj meze de arbaro
muzikis mi el kor'. | 4. Kaj tute mi ne scias,
ĉe vid' al paŝtistot',
pro kio mi envias
kaj ĝemas en sekret'. |



El la bulgara: Ilija ANDREEV